MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO 4

APRILO 2007 Kol.264/23

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo:** Asteroido Pitter V-a kongreso AEH Reago de Hiroŝima
J.Mařík/F.Kožík UK en Moskvo Non Handikap
El ricevita poŝto Telefoni senpage XV-a Abilimpiado
E-radio La du vazoj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx



La redakcio deziras al ĉiuj legantoj
de nia gazeto kontentajn paskajn festojn,
senĉesan bonhumoron kaj agrablan ĝuon
de sunaj printempaj tagoj.



## Asteroido 48785 Pitter portas nomon de ĉeĥa humanisto

La 23-an de septembro 1997 malkovris doktoro Petr Pravec el observatorio Ondřejov en sunsistemo asteroidon, kiu ricevis bazan nomon 1997 SA2. La origina inicianto de la nomumo estas al ni nekonata sinjorino el Červený Kostelec. Ŝi proponis al doktoro Grygar doni al la asteroido nomon de nia humanisto Pitter. La ideon akceptis doktoro Jiří Grygar kaj teknike ĝin realigis doktoro Kamil Hor-

noch. En la liston de la astronomia Instituto Ondřejov ĝi estis enskribita 28. 12. 2005.

El Interreto sur TTT-paĝoj de NASA, Jet Propulsion Laboratory, Kalifornia Teknologia Instituto ni citas titolon kaj tekston (tradukitan el la angla)

**(48785) Pitter**

Malkovrinto: Petr Pravec — Dato de la malkovro: 23.9.1997

Loko de la malkovro: Ondřejov — Baza nomo: 1997 SA2

La ĉeĥa filantropo kaj pacifisto Přemysl Pitter (1895-1976) zorgis pri senhejmaj infanoj. Dum la dua mondmilito li ŝirmis persekutatajn infanojn. Post la milito li fondis kaj mem estris resanigejojn por deprimitaj ĉeĥaj, germanaj kaj judaj infanoj. Li ricevis altajn ĉeĥajn, germanajn kaj izraelajn honorigojn, lia centjara naskiĝdatreveno UNESKO solenis kiel kulturan jubileon.


Karel Kraft

## La Kvina kongreso de AEH proksimiĝas

Post proksimume sep semajnoj okazos la V-a Internacia kongreso de AEH-IKEH en SEČ en moderne ekipitaj ĉambroj de Juniorcentro proksime de akvovalbaraĵa lago. Lokoj por tranoktado estas rezervitaj ĝis fino de aprilo. Poste ni devos liberigi neokupitajn lokojn al posedanto. Niaj membroj ofte kutimas aliĝi en lasta momento, sed ni poste ne povus al ili garantii tranoktadon.

**Samtempe ni informas, ke nia asocio konsideras ĉiujn abonantojn de la gazeto Informilo, kiel niaj membroj, ni ne diferencas, ĉu iu estas sana aŭ handikapita, pro tio bonvolu ĉiuj, kiuj ne povus partopreni la kongreson persone, sendi la balotbileton tiel, kiel estas skribita en kandidatlisto. Antaŭdankon.**






El la kadra programo de la kongreso ni elektas: Krom kunsidaj programoj de la konferenco kaj voĉdonado por la nova komitato okazos prelego je la kongresa temo "Ne estu sola" kaj pluaj prelegoj: Esperanto en mallongaj ondoj, Rememoro je gravaj jubilantoj (J.Mařík kaj F.Kožík), Interreta E-Ĉ-vortaro enhavas jam 180 mil vortojn, 120 jaroj de Esperanto kaj 90 jaroj de forpaso de d-ro Zamenhof.

Por ĵaŭda pieda promeno al akvovalbaraĵo Seč ni ricevis eksterordinaran permeson trarigardi ankaŭ internon de la valbaraĵo. Vendrede posttagmeze ni buse vizitos kaj ekkonos valbaraĵon Křižanovice, Keltan opidumon kun la muzeo en Nasavrky, parkon de manĝeblaj maronoj (kaŝtanoj), memorlokon Ležáky kaj skanzenon de popol-konstruaĵoj Hlinsko-Betlehemo.
Dum la dua busa posttagmeza ekskurso sabate ni vizitos ruinon de la burgo Lichnice, kastelon Žleby kun zoo-anguleto en kastela parko kaj en proksima ĉasbestaparko ni povos observi blankajn cervojn kaj aprojn (se ili akceptos nian viziton). Dum la reveno ni ekvidos pluan valbaraĵon Pařížov.

Ĉe la vesperoj vi ankaŭ ne enuos. Atendos vin videofilmo pri travivaĵoj de nia membro tra Usono kaj pri edziĝ-ceremonio ĉe kanadaj Niagaraj akvofaloj, pluan vesperon ni kantos ĉe violino aŭ akordeono kaj sabate vespere ni amuzos kaj dancos ĉe muzik-duo el proksima urbeto. Certe ankaŭ tombolo kontribuos al via bonhumoro. Do ni esperas, ke en SEČ ni renkontiĝos kun multaj geesperantistoj, kore invititaj estas ankaŭ nemembroj de AEH-IKEH.
Jen horaro de busoj el Pardubice al placo Seč: (tempo de la veturo proksimume 1 horon) stacio n-ro 11, forveturo: 10,20h., 12,45h, 15,55h, 19,10h
Dimanĉe forveturo de Seč: 10,01h, 12,00h, 12,10h, 15,28h.
Ni elkore ĝojatendas vian partoprenon! jary

## Reagoj de hiroŝimaj japaninoj:



La unua artikolo de pasinta marta Informilo informis vin pri peto de virinaj organizoj el japana urbo Hirošima, ke niaj memorantuloj sendu al ili rememoron je travivaĵoj de la Dua mondmilito. Nia redakcio scias nur pri s-anino Štefanová, kiu skribis al ili. Certe estos por vi interesa legi ilian respondon:

Kara S-ino Vera Stefanova,
Dank'al via kunlaboro okaze de Virina Tago 2007 en Hiroŝima, ni ricevis 158 mesaĝojn el 50 landoj kaj ili estis ekspoziciitaj de la 3-a ĝis la 9-a marto kaj la 10-an de marto dum la kunveno kun 330 partoprenantoj.
La partoprenantoj ricevis belan broŝuron de la mesaĝoj kun mencio, ke peris ĝin "Esperanto tutmonda". Oni denove ekspozicios la mesaĝojn okaze de pligranda kunveno de virinoj en aprilo, kaj okaze de tutlanda kunveno de la Japana Virina Konferenco en oktobro 2007. Samideane Osioka Taeko

# Rememoro je datreveno de du eminentaj meritplenaj esperantistoj



Jaroslav Mařík
*22.12.1913 - +3.5.1997



František Kožík
*16.5.1909 - +5.4.1997

Antaŭ 10 jaroj mortis tiuj ĉi ĉeĥaj eminentaj personuloj, grandaj amikoj, honoraj membroj de ĈEA, kiuj tiel multe faris por prosperigado de nia internacia lingvo Esperanto. Kiam Jaroslav Mařík, dum la funebra ceremonio adiaŭis František Kožík, dividis ankaŭ lin nur unu monato de porĉiama forpaso.

Renoma tradukinto, eksterordinare bona eksperto de E-historio kaj literaturo, lingva fakulo, spertulo en modela prononcado de la lingvo, lerta aŭtoro de priesperantaj eseoj, iama parolisto de La esperantlingva elsendo de Radio-Praha – jen, tia estis s-ano **Jaroslav Mařík.**

**František Kožík**, doktoro de juro, sed ankaŭ altlerneja pedagogo, poeto, aŭtoro de filmaj scenaroj, dramoj por radio-elsendoj kaj biografiaj historiaj romanoj, ŝatata verkisto ankaŭ por infanoj. Li mem lernis Esperanton pere de radiokurso en la jaro 1931. Jam de la jaro 1933 li apartenis al grupo de profesiaj aŭtoroj kaj kantistoj, verkis tekstojn de kantoj, operoj kaj operetoj en la internacia lingvo.

Tiel estis kreita serio da radio-artaĵoj en Esperanto, kiun la eŭropa aŭskultantaro nomis Verda stacio. En la radio-grupo aktive rolis ankaŭ lia edzino, s-ino Zdeňka Kožíková-Švabíková, la eminenta aktoro Karel Höger kaj pluaj aliaj famaj homoj. Tamen, en la j. 1949 F. Kožík pro politikaj kialoj, ne rajtis siajn literaturaĵojn publici kaj la vivrimedojn li prizorgis kiel helplaboristo en la aŭtomobil-fabriko en Mladá Boleslav.

Ne eblas ĉi tie nomi abundan verkaron de ambaŭ eminentuloj, nur mi volus instigi niajn membrojn por iomete ekmediti kaj rememori ilin.


jary

## UK en Moskvo? Eble jes!

La plej granda E-aranĝo eble finfine okazos en Rusio. Moskva registaro entuziasme subtenis la ideon pri la invitado de Universala Kongreso de Esperanto al Rusio en 2009-a jaro. La propono estis prezentita al la urba registaro nome de la Moskva iniciata grupo, subtenita de REU.

Ĉefrolis en la "trabatado" tra la diskutrondoj de la burokratia aparataro moskvaj altranguloj-esperantistoj Gennadij Ĉilo kaj Valerij Sipoviĉ. Subtene por ili en tiu ĉi unua etapo agadis Svetlana Smetanina, Nikolaj Gudskov, Mikaelo Ĉertilov, Liana Tuvatullina, Garik Kokolija kaj Andrej Grigorjevskij.

La unuaj esperigaj rezultoj estis atingitaj jam en decembro 2006, la agado daŭris post la longegaj novjaraj festoj. Finfine komence de februaro 2007 la dokumentojn aprobis kaj rezoluciis pri la subteno la urbestro de Moskvo Jurij Luĵkov. Pasintsemajne okazis tre sukcesa renkontiĝo de niaj reprezentantoj kun la moskva ministro pri internaciaj ligoj kaj turismo I. Ordĵonikidze, kiu jam agis por plenumi tiun komision.



Konkretiĝis la traktadoj per "ekspertnivela" kunveno. Estis interkonsentitaj la formuloj de la dokumentoj, laŭ kiuj Moskvo prezentos diversmanieran praktikan kaj materian helpon por la okazigo de la kongreso, se UEA decidos okazigi ĝin en nia ĉefurbo. La registaro preparos kaj transdonos al la iniciata grupo ĉiujn oficialajn garantiojn, bezonataj por prezenti al UEA validan inviton.

Sekvaetape helpe de tiuj dokumentoj, helpe de bone preparita turisma kaj movada prezento de Moskvo, ciferoj, prezaroj ktp, ni devos konvinki UEA-n, ke nia propono estas la plej interesa el la havataj.
Ĉiuj interesiĝantoj kundiskuti kaj kunagadi estas invitataj veni al REK kaj EoLA en Tiĥvin!
Amike Andrej Grigorjevskij, prezidanto de REU
<grigorjevskij@yahoo.co.uk> el [E-rus-info]

## NON - Handikap 2007

estas nomo de la 11-a specialigita ekspozicio por handikapitaj homoj, kiu okazos en 17. – 20. 4.2007 en Ekspoziciejo "Výstaviště Praha – Holešovice". Pragaj membroj, kiuj partoprenos, povus skribi al nia redakcio pri tiu aranĝo. Tradukita el la ĉeĥa ĵurnalo.

## El ricevita poŝto:

1) Kara amikino redaktorino, tre kore mi dankas por kopiaĵoj de Ordo de Diservo, prediko kaj E-himno el la jaro 1908, ankaŭ por Informilo n-ro 3. Kun intereso mi tralegis preskaŭ centjaran predikon kaj ankaŭ la Informilon.
Aktivadojn de AEH mi alte taksas, ĉar ĝi okupiĝas pri handikapitaj personoj, kiuj ofte sin sentas kaj ofte eĉ estas forpuŝitaj randen de la socio. Hodiaŭ per amaskomunikiloj estas kiel modelo prezentata homo juna, bela, riĉa, malgraŭ tio, ke interno (animo) de tiu homo plej ofte estas putraĵo. La homoj handikapitaj spite de siaj korpaj difektoj estas plejofte homoj kun nobla koro, afablaj, bonkoraj, kiuj plene meritas atenton flanke de ni, kiuj vivas sen gravaj korpaj sanproblemoj. Tial mi deziras al aktivadoj de AEH benon de Dio, kiu certe tiujn aktivadojn kun patreca amo rigardas.
Kore kaj frate ĉiujn AEH-anojn salutas Miloslav Šváček.

2) El la urbo **Litomyšl** venis mesaĝo:
Per Esperanto al la tuta mondo – nomiĝis prelego, kiu okazis la 20-an de marto en urba biblioteko, prelegis ges-anoj Z.Novotná kaj J.Pištora. La prelegon por interesuloj kaj neesperantista publiko akompanis E-ekspozicio. La prelegon vizitis la redaktorino de la regiona radioelsendejo, la intervievo pri propagando de Esperanto inter junaj homoj estis elsendita post du tagoj. Bedaŭrinde, en la tago de la prelego estis ege malbona vetero kaj kvankam multaj promesis, la ĉeesto ne estis granda. J.Flídr

3) E-klubo "La ponto" en la urbo **Písek** sincere invitas vin al II-a SABLA PRINTEMPO (Písecké jaro) sabate la 14-an de aprilo 2007. Informoj: V.a P. Dvořákovi, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 999 091, retadreso: vl.dv@centrum.cz

## Telefoni senpage pere de komputilo

Utiligu la novan eblecon paroli Esperanton helpe de SKYPE-sistemo. Oni bezonas nur trovi en la interreto dosieron SKYPE kaj instali ĝin. Temas pri la progra-

mo, kiu ebligas paroli per la komputilo kaj mikrofono senpage kun ĉiuj uzantoj en la mondo, kiuj havas ĝin ankaŭ instalitan en la komputilo.Unu membro informis nian redakcion, ke li jam atingis 200 kontaktojn el la tuta mondo.(SKYPE de la redakcio de AEH= "jary_esperanto") red.

## La XV-a jubileo de abilimpiado

- t.e. nacia konkurso de labor-kapabloj kaj lertoj, destinita por handikapitaj plenkreskuloj, okazos en la tagoj 25. – 26. 5. 2007 en malgranda halo de ČEZ-stadiono en Pardubice. La komenca amplekso de 19 branĉoj ĉiujare kreskas. Ĝia komitato decidis vastigi la fakbranĉojn nunjare ĝis la nombro 35 kaj pri tiu ĉi konkurso grandiĝas la intereso.

red.

## Esperanto-radioj, 24-hora elsendo

Tage kaj nokte iam ajn oni povas ĝui Esperantan muzikon aŭ Esperantajn radioelsendojn tra interreto. Lastatempe aperis eĉ 2 stacioj, kiuj senstope en 24 horoj elsendas Esperantajn aŭd-programojn.

**1. Radio-Esperanto.com**

Esperanta muziko en 24 horoj, en elektebla formato mp3 aŭ ogg! Teknike bonkvalita elsendo-fluo kaj elektebla formato "mp3" aŭ "ogg". Krom aŭskulti la muzikon oni vidas ankaŭ la kovrilon de KD kaj ofte legeblas ankaŭ la teksto de la kanto. La prizorganto/redaktoro Tony Freeman <tony@radio-esperanto.com> bonvenigas vian helpon per alsendo de mankantaj tekstoj. Provu la elsendon kaj aldonu ĝin al viaj favoritoj: http://www.radio-esperanto.com

**2. Esperanto-Radio Jászberény**


Relative nova radioprogramo, redaktita de s-ro Harnyos Ferenc <hferenc@pr.hu> en urbo Jászberény, Hungario. La 24-hora elsendo inkluzivas Esperantan muzikon, intervjuojn, reelsendojn de malnovaj programoj, aŭdio-interesaĵojn, ripeton de programeroj de Pola Radio, ktp. Formato de la elsendo-fluo: mp3. Provu la elsendon kaj aldonu ĝin al viaj favoritoj: http://87.242.26.81:8000/listen.pls Multaj homoj enŝaltas radion por havi fonan muzikon dum la tago. Kial tiu fona muziko ne estu Esperanta, se vi estas apud komputilo?


L.S. fonto: Ret-info:

## La du vazoj (ĉina fabeleto)

Maljuna ĉina virino havis du grandajn vazojn, pendantajn je la ekstremo de bastono, kiun ŝi portis sur la ŝultroj. Unu el la vazoj havis fendon, dume la alia estis

perfekta kaj estis ĉiam plena da akvo fine de longa marŝado de rivereto al domo, dume tiu krevita vazo restis duone malplena.
Dum du jaroj la afero daŭrigis tiel, ke la virino portis hejmen nur unu plenan vazon kaj nur duonon da akvo el la dua vazo. Kompreneble la perfekta vazo estis fiera por siaj rezultoj. Sed la mizera fendita vazo hontis pro sia difekto kaj ĝi estis humiligita por tio, ke ĝi povas fari nur duonlaboron, por kiu ĝi estis produktita.





Post du jaroj, dum kiuj ĝi konsciiĝis pri sia amara fiasko, iun tagon ĝi parolis al la virino dumvoje: "Mi hontas pri mi mem, ĉar ĉi tiu fendo sur mia flanko kaŭzas tion, ke la akvo survoje foriras, anstataŭ estu alportata al vi hejmen." La maljunulino ridetis: „Ĉu vi ne rimarkis, ke sur via flanko kreskas floroj sur la vojeto, sed ili ne kreskas sur la flanko de alia vazo? Tial, ke mi scias pri via difekto, pro tio mi plantis semojn de floroj sur via flanko de la vojeto kaj vi ĉiutage dum la reveno akvumis ilin. Jam du jarojn mi povis rikolti tiujn belajn florojn por dekoracii la tablon. Se vi ne estus tia, mi ne havus florojn por delikatigi la hejmon".

Ĉiu de ni havas propran specifan difekton kaj ĝuste la fendo kaj la difekto, kiujn ni havas, kreas nian kunvivadon pli interesa kaj pli utila.

Tradukis Giuseppe Affaticati el Italio, al la redakcio sendis O.Glendová.


**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: M. Filip, J. Kosnar, J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh-ikeh@volny.cz** interreto: **www.volny.cz/aeh-ikeh**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo= 150,-Kč ,příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €.
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.